Edzo: mari

Ekonomia: économique

Ekzameno: examen

Esperi: espérer

Fari: faire

Farti: se porter(santé)

Feliĉigi: rendre heureux

Feritempo: vacances (**ferio** = jour non travaillé)

Flava: jaune

Flaviĝi: jauni

Fortigi: fortifier

Ĝis: jusqu'à

Haro: cheveu

Horo: heure

Iam: parfois

Infano: enfant

Informi: informer/renseigner

Io: quelque

Jam: déjà

Juna: jeune

Kamelo: chameau

Kariero: carrière (études)

Konsento: consentement

Korpo: corps

Kuracisto: médecin

Lasta: dernier-dernière

Latinameriko: Amérique Latine

Lipo: lèvre

Malboniĝi: empirer

Malfortigi: affaiblir

Medikamento: médicament

Mizero: misère

Mortigi: tuer

Neniam: jamais

Nigrigi: noircir, se noircir, devenir noir, mais pas noircir qqch : **nigrigi!**

Nokto: nuit

Nun: maintenant

Pardono: pardon

Pasi: passer

Plori: pleurer

Pluvi: pleuvoir

Printempo: printemps

Rajdi: monter

Rakonti: raconter

Ridi: rire

Ruĝiĝi: rougir

Salo: sel

Sanigi: guérir, se guérir

Semajno: semaine

Situacio: situation

Sporto: sport

Sukcesi: réussir

Tempo: temps chronologique

Tie ĉi: ici

Tie: là

Tondri: tonner

Unua: premier-première

Varmigi: chauffer

Vetero: temps atmosphérique

Vino: vin

Viziti: visiter

Vojaĝi: voyager

Voli: vouloir

Zorgo: préoccupation/souci

EXERCICES leçon 9

-Bonvolu respondi en Esperanto la jenajn (suivantes) demandojn:

1. Ĉu mia avino povis baloti, kiam ŝi estis juna?
2. Kiam vi estis en Afriko?
3. Ĉu la sportoj fortigas la korpon?
4. Ĉu dum vintro (hiver) la temperaturo estas varma aŭ malvarma?
5. Ĉu vi pensas ke la mono feliĉigas la homon?
6. Kiu estas la plej mallonga monato de la jaro?

-Bonvolu traduki al Esperanto:

7. Diego exagère (**troigas**). toujours. Il dit que l'oncle d'Antoine est très riche.
8. Vous voulez bien me passer le sel ?
9. Je prends le bus qui va au centre-ville tous les jours (**ĉiutage**)
10. Les deux cousins se sont disputés (**kverelis**) et puis ils se sont réconciliés.
11. À cause de (**kaŭze de**) la fumée la cheminée (kamen) s'est noircie.

REPONSES leçon 9

1. Ne, via avino ne povis baloti kiam ŝi estis juna.
2. Neniam mi estis en Afriko. (Mi estis en Afriko en la jaro....).
3. Jes, la sportoj fortigas la korpon.
4. Dum vintro la temperaturo estas malvarma.
5. Ne, mi ne pensas ke la mono feliĉigas la homon. (Jes, mi pensas ke la mono feliĉigas la homon).
6. Februaro estas la plej mallonga monato de la jaro.
7. Diego ĉiam troigas. Li diras ke la onklo de Antono estas riĉega.
8. Bonvolu pasi al mi la salon.
9. Ĉiutage mi prenas la omnibuson, kiu iras al la centro.
10. La du kuzoj kverelis kaj poste reamikiĝis. (aŭ amikiĝis denove)
11. Pro la fumo la kamen) nigriĝis.

Leçon 10 : corrélatifs de quantité, l'heure, le conditionnel, les corrélatifs

KIOM: combien

IOM: quelque, un peu

- * **Kiu tago estas hodiaŭ? – demandis mia edzino.**
- * **Hodiaŭ estas merkredo – respondis mi.**
- * **Kioma horo estas?** (Littéralement: Quelle heure est-il?)
- * **Estas la oka (horo).** (Il est fréquent de supprimer les mots "horo" ou "minutoj").
- * **Mi devas iri al la panejo (boulangerie). Ĉu vi deziras akompani min?.**
- * **Certe (bien sûr). Kun plezuro! (plaisir)**

La panisto salutis nin afable: - Bonan matenon. ("bonan matenon" c'est la forme abrégée de: **Mi deziras al vi bonan matenon**).

- * **Kiom kostas la pano?** (Combien coûte le pain?) – **demandis mia edzino.**
- * **Unu kilo kostas du frankojn. Kiom da (°) pano vi bezonas?** (tu as besoin/vous avez besoin)
- * **Mi bezonas du kilojn. Mi ankaŭ aĉetos tiun kukon (gâteau).**
- * **La kuko kostas kvin frankojn.**
- * **Ne. Mi nur volas iom (un peu)**
- * **Ĉu vi ne volas aĉeti biskvitojn (biscottes)?**
- * **Jes. Bonvolu doni al mi unu kilon.**

La panisto faris la kalkulon (compte/addition). Ni pagis kaj foriris (for: hors/dehors; iri: aller) (nous sommes sortis).

- * **Dankon! – diris la panisto.**
- * **Ĝis revido! (au revoir) – ni respondis.**

(°) Remarque: **da** (de) est employé après un mot qui indique une quantité ou une mesure. Exemples: **Du kiloj da pano. Tri litroj da vino.**

Kiom kostas la tagmanĝo en tiu restoracio?. Ĝi kostas dek (10) frankojn.

Kiom kostas tiu poŝtkarto?. Ĝi kostas sesdek (60) cendojn.

Kiom kostas tiu ora horloĝo ?. Ĝi kostas du mil frankojn.

KIOMA HORO ESTAS ?

- Quelle heure est-il?
- **Estas la unua kaj dek**
- **Estas la unua kaj dek kvin**
- **Estas la unua kaj tridek**
- **Estas dudek antaŭ la dua**
- **Estas dek kvin antaŭ la dua**
- **Estas kvin antaŭ la dua**

À midi on peut dire: **Estas la dek dua** ou: **Estas tagmezo** (midi)

À minuit on peut dire: **Estas la dudek kvara** ou: **Estas noktomezo** (minuit)

- **Ŝi havas belan brakhorloĝon** (montre) (**brako:** bras).
- **La maljuna sinjoro havas poŝ-horloĝon** (montre de poche).

- **La vekhorloĝo** (réveille-matin) **vekas nin**.
- **La murhorloĝo** (horloge) **estas sur la muro** (mur).

- **Kiom aĝa vi estas?** (Littéralement: Quel âge avez-vous/as-tu?) (**aĝo**: âge).
- **Kiom jara vi estas?** (De sens pareil au précédent)

Nous avons vu que les verbes au présent se terminent en "**AS**" (**mi skribas, vi legas**); au passé ils se terminent en "**IS**" (**li laboris, ŝi kantis**), au futur en "**OS**" (**ni parolos, ili vojaĝos**). S'il y a une condition préalable à la réalisation d'une action on dit que ce verbe est au MODE CONDITIONNEL. En Espéranto ce type de verbes se terminent en "**US**".
Exemples:

SE: si

- **Se (si) mi estus riĉa, mi vojaĝus al Eŭropo.**
- **Se ŝi havus monon, ŝi ne devus labori.**
- **Se li estus ministro, li havus multajn sekretariojn.**
- **Kion vi farus en Eŭropo? Mi vizitus la muzeojn.**
- **Kion vi skribus se vi estus poeto? Mi skribus belajn poemojn.**
- **Kion vi farus se vi estus pentristo? Mi pentrus pejzaĝojn** (paysages)

LE SUFFIXE – AĴ : Il sert à indiquer l'objet, le produit obtenu avec le radical du mot d'origine. Exemples:

Manĝi: manger

Trinki: boire

Legi: lire

Pentri: peindre

Dolĉa: doux

Nova: nouveau/ nouvelle

Manĝaĵo: nourriture/aliments

Trinkaĵo: boisson

Legaĵo: lecture

Pentraĵo: peinture

Dolĉaĵo: friandises (bonbons, etc.)

Novajaĵo: nouveauté

- **Mi estas malsata** (j'ai faim). **Mi aĉetos manĝaĵon** (nourriture/aliments)
- **Mi soifas** (j'ai soif). **Mi volas trinkaĵon** (boisson).
- **Li serĉas** (cherche) **la ĵurnalon**. **Li deziras legi la novaĵojn**.
- **Se vi deziras vidi la pentraĵojn** (peintures) **de famaj pentristoj, vi devas viziti tiun muzeon**.
- **Ŝi ne ŝatas** (aime) **dolĉaĵojn kaj ŝi ne deziras dikiĝi** (grossir).
- **Kial ŝi ploras? Ŝi ricevis malbonan novaĵon**.
- **Kion** (qu'est-ce que) **li havas en tiu sako** (sac)? **Li havas valorajn aĵojn** (choses).
- **Ĉu vi trinkos viskion** (whisky)? **Dankon, mi ne trinkas alkoholaĵojn** (boissons alcooliques).

DIALOGO inter edzo kaj edzino

Klara: - **Mi devas iri al la apoteko** (pharmacie) **por aĉeti sapon** (savon), **dentbroson** (brosse à dents), **tubon de dentkremaĵo** (pâte dentifrice), **ŝampuon** (shampooing), **kolonjan akvon** (eau de toilette) **kaj tubon de razkremaĵo** (crème à raser) (**razi**: raser).

Ĉu vi deziras akompani min?

Georgo (Georges): **Jes. Kun plezuro!**

Klara: - **Kaj vi pagos la fakturon...**

LA SEZONOJ (Les saisons)

Printempo: printemps

Somero: été

Aŭtuno: automne

Vintro: hiver

- **Kiu sezono estas la plej varma? Somero estas la plej varma sezono.**
- **Ĉu vi ŝatas** (aimes/aimez) **la vintron? Ne, ĉar ĝi estas tre malvarma.**
- **Kion vi pensas pri la printempo? Mi pensas ke ĝi estas la plej bela sezono.**
- **Ĉu vi vojaĝas dum la somero? Jes. Mi iras al la montaro** (montagnes).
- **Ĉu vi ĉiam** (toujours) **iras al la montaro? Ne. Kelkfoje** (parfois) **mi iras al la plaĝo** (plage).

Leterfragmento:

Kara amik(in)o: Mi ricevis vian afablan kaj interesan leteron. Koran dankon! Mi esperas ke vi kaj familio fartas (se porte) bone. Dank'al Dio mi fartas bone. Jam antaŭ kelkaj tagoj mi komencis skribi ĉi tiun leteron, sed mi ne povis fini ĝin, ĉar mi havis multan laboron. Nun estas la deka vespere (vespero: soir, de 18h à 24 h). Mi dezirus scii (savoir) ĉu estas Esperanto grupo aŭ aliaj esperantistoj en via urbo. Ĉu vi havis la okazon (occasion) vojaĝi al aliaj urboj de via lando aŭ al eksterlando (étranger), kaj kontakti kun esperantistoj. Ĉu vi iam partoprenis (a participé) en kongreso de Esperanto?. En mia urbo (estas Esperanto- grupo) (ne estas Esperanto- grupo) (estas aliaj esperantistoj) (ne estas aliaj esperantistoj). Mi multe ŝatus (aimerais) se vi priskribus (décrivez/décriviez) viajn spertojn en Esperanto-kongresoj. Mi supozas ke devas esti neforgesebla (inoubliable) sperto (expérience) paroli kun personoj, kiuj ne scias nian lingvon (langue).

CORRÉLATIFS

En les comparant, vous découvrirez la logique de ces mots très pratiques (le i au milieu du mot permet simplement de faire la liaison entre ses parties):

INDÉFINIS

Iu → Quelqu'un

Ia → Quelque

Io → Quelque chose

Ies → De quelqu'un

Iom → Un peu

Ie → Quelque part

Iam → Un jour, parfois

Ial --> Pour une quelconque raison

Iel --> D'une certaine façon

INTERROGATIFS RELATIFS

Kiu → Qui, lequel

Kia → Quoi, lequel, que

Kio → Quoi, ce que

Kies --> De qui

Kiom → Combien

Kie → Où

Kiam → Quand

Kial → Pourquoi

Kiel → Comment, de quelle manière

DÉMONSTRATIFS

Tiu → Ce, celui-ci, celui-là

Tia → Tel

Tio → Ce, cela

Ties → D'une personne

Tiom → Tant, si, tellement

Tie → Là, là-bas

Tiam → Alors, à ce moment-là

Tial → C'est pourquoi, pour cette raison

Tiel → Donc, ainsi

COLLECTIFS

Ĉiu → Chacun, tous

Ĉia → Chaque

Ĉio → Tout

Ĉies → De chacun, de tous

Ĉiom → Le tout

Ĉie → Partout

Ĉiam → Toujours

Ĉial → Pour toutes les raisons

Ĉiel → De toute façon

NÉGATIFS

Neniu → Personne, aucun

Nenia → Aucun/e

Nenio → Rien

Nenies → De personne

Neniom → Rien, aucun

Nenie → Nulle part

Neniam → jamais

Nenial → Pour aucune raison

Neniel → D'aucune façon

La troisième partie d'un corrélatif représente :

Individu	-u	Lieu	-e
Qualité	-a	Temps	-am
Chose, catégorie	-o	Cause	-al
Possession	-es	Manière	-el
Quantité	-om		

"L' Espéranto est la meilleure solution à l' idée d'une langue internationale".
Albert Einstein.

VOCABULAIRE leçon 10

Aĝo: âge	Foriri: sortir	Plori: pleurer
Aĉeti: acheter	Franko: franc (monnaie)	Poŝhorloĝo: montre de poche
Afable: gentiment	Hodiaŭ: aujourd'hui	Poemo: poème
Akompani: accompagner	Horloĝo: horloge	Poeto: poète
Apoteko: pharmacie	Horo: heure	Razi: raser
Bezoni: avoir besoin	Kalkulo: compte	Razkremaĵo: crème à raser
Biskvito: biscotte	Kelfoje: quelquefois	Sako: sac
Brakhorloĝo: montre	Kilo: kilo, kilogramme	Saluti: saluer
Cendo: centime	Kolonja akvo: eau de toilette	Sapo: savon
Certe: certainement/biensûr	Kosti: coûter	Sata: sans faim
Ĉiam: toujours	Kuko: gâteau	Sekretario: secrétaire
Da: de	Malsata: qui a faim	Serĉi: chercher
Demandi: demander	Merkredo: mercredi	Soifi: avoir soif
Dentbroso: brosse à dents	Ministro: ministre	Ŝampuo: shampooing
Dentkremaĵo: pâte dentifrice	Montaro: montagne	Ŝati: aimer
Dika: gros-grosse	Murhorloĝo: horloge	Tagmezo: midi
Dikiĝi: grossir	Noktomezo: minuit	Tago: jour
Eniri: entrer	Nur: seulement	Varma: chaud
Fakturo: addition (compte-ticket)	Oro: or	Vekhorloĝo: réveille-matin
Fama: célèbre	Pejzaĝo: paysage	Viskio: whisky
Fojo: fois	Plaĝo: plage	
	Plezuro: plaisir	

EXERCICES leçon 10

1. Kioma horo estas kiam vi respondas tiun ĉi demandon?
2. Kiom kostas kilo da pano en via lando?
3. Kiom aĝa vi estas?
4. Kion vi farus se vi estus la prezidanto de via lando?
5. Ĉu vi ŝatas manĝi dolĉaĵojn?
6. Kiujn trinkaĵojn vi preferas: sukojn (jus), vinon, bieron, viskion?
7. Je kioma horo vi tagmanĝas? (À quelle heure vous déjeunez?)

Remarque: "Je" est une préposition indéfinie qui est utilisée quand le sens de la phrase ne permet pas d'utiliser une autre de sens plus précis. Il y a d'autres prépositions telles que "de", "en", "inter", etc.

Exemples: Nous pouvons dire "la patro de María", "en la skatolo (boîte) estas multaj numeroj", "Germanio estas inter Francio kaj Pollando (Pologne)". Il y a des cas (très rares) où l'on ne peut utiliser aucune préposition au sens défini, alors on se sert de "je".

Esperanto havas tre riĉan literaturon, originalan kaj tradukitan. Estas multaj libroj originale verkitaj (verki: écrire des oeuvres) en tiu lingvo, kaj la plej gravaj verkoj de la monda literaturo estas tradukitaj en Esperanto. El la hispana ni havas: "Don Quijote de la Mancha", "Doña Bárbara", de la venezuela aŭtoro Rómulo Gallegos, kaj "Martín Fierro", de la argentina poeto José Hernández.

Jen (voici) fragmento el "Doña Bárbara": "La Savano (La plaine) estas samtempe loga (captivant) kaj terura (terrifiant). En ĝi kuŝas (s'étend) vasta spaco por bela vivo kaj horora (horrible) morto; ĉi lasta embuskas ĉie, sed neniu ĝin timas. La Savano

imponas, sed la timo al la Savano ne paralizas la koron; la Savano varmigas kiel la potenca vento de ĝia sunplena senfineco (énorme étendue), kiel la febro de ĝiaj marĉoj (marais, marécages).

La Savano frenezigas (rend fou), kaj la frenezo de la homo de la libera kaj senlima (illimitée) tero konsistas en tio, ke li volas ĉiam esti savano".

REPONSES leçon 10

- 1. Kiam mi respondas tiun ĉi demandon estas la.....**
- 2. En mia lando kilo da pano kostas.....frankojn (cendojn).**
- 3. Mi estas..... – jara.**
- 4. Se mi estus la prezidanto de mia lando mi laborus por la popolo.**
- 5. Jes, mi ŝatas manĝi dolĉaĵojn. (Ne, mi ne ŝatas manĝi dolĉaĵojn).**
- 6. Mi preferas sukojn (vinon, bieron, viskion).**
- 7. Mi tagmanĝas je la tagmezo.**

Leçon 11 : prépositions, affixes -ec, -em, -an,

LE SUFFIXE – EC: Il indique une qualité abstraite. On le comprendra mieux avec des exemples.

Bela: beau/belle

Bona: bon/bonne

Klara: clair/e

Amiko: ami

Facila: facile

Beleco (pron."beletso"): beauté

Boneco (pron."bonetso"): bonté

Klareco (pron."klaretso"): clarté

Amikeco (pron."amiketso"): amitié

Facileco (pron."faciletso"): facilité

- **La beleco kaj la boneco de tiu fraŭlino:** la beauté et la bonté de cette demoiselle.
- **La facileco de Esperanto:** la facilité de l' Espéranto.
- **Esperanto faciligas la amikecon inter la popoloj:** L'Espéranto facilite l'amitié entre les peuples.
- **La juneco estas granda trezoro** (trésor).
- **Kial li amas tiun fraŭlinon? Li amas ŝin pro** (par, à cause de) **ŝia beleco kaj boneco.**
- **Ĉu vi admiras la facilecon de Esperanto? Jes, certe, mi admiras la facilecon de Esperanto.**
- **Ĉu Esperanto faciligas la amikecon inter la popoloj?.Jes, sendube** (sans aucun doute) **Esperanto faciligas la amikecon inter la popoloj.**

SENDUBE: sans aucun doute

- **Ĉu la juneco estas granda trezoro? Jes. La juneco estas granda trezoro.**
- **"Riĉeco estas frato de fiereco** (orgueil/arrogance)". (Proverbo)

ANEKDOTO (de F. Szilagyi)

- **Oni** (on) **parolas pri** (sur, à propos de) **la maljuneco** (vieillesse). **Sinjoro diras:**
- **mia avino** (grand-mère) **mortis en sia 96- a jaro.**
- **La alia** (autre) **diras:** - **mia onklo mortis en sia 103 – a jaro.**
- **La tria sinjoro diras:** - **Tio estas nenio** (rien). **Mi havas onklon. Li absolute ne mortis. Li ankoraŭ** (encore) **vivas.**

ONI : Pronom personnel indéfini: on.

Oni diras ke.....: On dit que.....

Oni diras ke hodiaŭ pluvos (il pleuvra).

Oni diras ke eble (probablement) **okazos** (aura lieu) **tertremo** (tremblement de terre).

Oni diras ke vi parolas Esperanton. Ĉu ne?

RÉVISION DE QUELQUES PRÉPOSITIONS

Per: au moyen de, par

- **La ĉarpentisto** (menuisier) **laboras per la martelo.**
- **Ni skribas per kraĵono** (crayon) (pron."kraĵono")

Pri: sur (à propos de)

- **Ni parolas pri muziko.**
- **Ili havas ekzamenon pri matematiko.**

Pro : par (à cause de)

- **Li mortis pro malsano** (maladie).
- **Zamenhof mortis pro kormalsano** (maladie cardiaque) (**koro**: coeur)

Por : pour

- **La esperantistoj laboras por la paco** (paix).
- **Ŝi aĉetos ĉemizon por sia edzo** (mari).

onklo: oncle

onklino: tante

nevo: neveu

nevino: nièce

kuzo: cousin

kuzino: cousine

avo: grand-père

avino: grand-mère

nepo: petit-fils

nepino: petite-fille

- **La frato de via patro aŭ patrino estas via onklo.**
- **La fratino de via patro aŭ patrino estas via onklino.**
- **Vi estas nevo de via onklo kaj onklino.**
- **Ŝi estas nevino de sia onklo kaj onklino.**
- **Li estas nepo de sia avo kaj avino.**
- **Ĉu vi havas kuzojn kaj kuzinojn?**

LE SUFFIXE – EM : Il indique la tendance ou le penchant. Exemples:

- **Mensogi**: mentir

Mensogema: menteur-euse

- **Labori**: travailler

Laborema: travailleur-euse

- **Paroli**: parler

Parolema: loquace

- **Babili**: bavarder

Babilema: bavard

- **Dormi**: dormir

Dormema: grand dormeur

- **Tiuj sinjorinoj ŝatas babili. Ili estas babilemaj.**

- **Tiu knabo** (jeune homme) **estas mensogema.**

- **La komizo** (employé) **alvenis** (est arrivé) **malfrue** (en retard). **Li estas dormema.**

- **La ĉefo** (chef) **estas kolerema** (coléreux) (**kolero**: colère)

- **Ĉu vi estas laborema aŭ mallaborema? Mi estas laborema.**

- **Kiel** (comment) **estas knaboj, kiuj ofte** (fréquemment) **mensogas? Ili estas mensogemaj.**

- **Kelkaj personoj estas timemaj** (peureux) (**timi**: craindre).

LE SUFFIXE – AN : Il sert à indiquer l'habitant ou le membre (de club, association, etc.), celui qui adhère à une religion ou à un idéal.

- **Urbo**: ville

Urbano: urbano (citadin)

- **Vilaĝo**: village

Vilaĝano: habitant d'un village (villageois)

- **Ameriko**: Amérique

Amerikano: américain

- **Klubo**: club

Klubano: membre d'un club

- Rotary club

Rotariano: membre du Rotary Club

- **Kristo**: le Christ

Kristano: chrétien

- **Islamo**: Islam

Islamano: mahométan

Samideano: "samideano", qui partage les mêmes idées (employé seulement entre les espérantistes) (**sama**: égal; **ideo**: idée; **ano**: membre).

OFTE: fréquemment (adverbe)

- **Petro loĝas** (habite) **en Montevideo. Li estas urbano.**

- Mi loĝas en vilaĝo. Mi estas vilaĝano.
- La klubanoj havas kunvenon (réunion) (kun: avec; veni: venir).
- La rotarianoj ofte (fréquemment) kunvenas (se retrouvent).
- En la mondo estas multaj kristanoj.
- Ĉu vilaĝanoj estas pli trankvilaj (tranquilles) ol urbanoj? Jes. Vilaĝanoj estas pli trankvilaj.
- Ĉu vi estas urbano aŭ vilaĝano?
- Kiam (quand) kunvenas la rotarianoj? Ili ofte kunvenas.

" Pardonemeco (miséricorde) superas justecon (justice)". (Proverbo)

INTER: entre (préposition)

Inter Eŭropo kaj Ameriko estas la Atlantika Oceano.

Inter Meksiko kaj Argentino estas longa (longue) distanco.

Leterfragmento:

Kara amik(in)o: Mi ricevis vian intereseĝan (très intéressante) leteron (kaj la belan poŝtkarton). Dankon!. Nun mi deziras iomete paroli pri mia lando. Niaj precipaj (principales) riĉecoj estas (agrikulturo: kultivo de tritiko (blé), maizo, aveno, kafo, teo, mateo (maté), tabako, diversaj fruktoj), (bestbredado: élevage) (fiŝkaptado: pêche) (petrolo) (teksta industrio: industrie textile) (turismo) (mineraloj). Ĉu estas tipika folkloro muziko kaj kostumoj (habits) en via lando aŭ regiono?. Kun miaj koraj salutoj, mi atendas vian respondon.

"L' Espéranto est un investissement considérable avec des perspectives favorables"
Rabindranath Tagore

EXERCICES leçon 11

-Répondez en Espéranto aux questions suivantes

1. Ĉu vi admiras la facilecon de Esperanto?
2. Kion vi opinias pri la anekdoto de F. Szilagyî?. Ĉu ĝi ne estas iom naiva (naïve)?
3. Ĉu vi loĝas en urbo aŭ en vilaĝo?
4. Ni estas latinamerikanoj. Ĉu mi pravas?
5. Ĉu estas aliaj (autres) samideanoj en via urbo?

VOCABULAIRE leçon 11

Admiri: admirer	Islamano: mahométan, musulman	Ofte: fréquemment
Alveni: arriver	Juneco: jeunesse	Okazi: avoir lieu
Amerikano: américain	Knabo: garçon	Oni: on
Amikeco: amitié	Klareco: clarté	Onklo: oncle
Anekdoti: anecdote	Klubano: membre de club	Paco: paix (pron. "patso")
Atlantika Oceano: Océan Atlantique	Kolerema: coléreux	Pardonemeco: miséricorde, pitié
Avo: grand-père	Komizo: employé	Parolema: bavard-e
Babilema: bavard-e	Kristano: chrétien	Persono: personne
Beleco: beauté	Kunveni: se retrouver	Pluvi: pleuvoir
Boneco: bonté	Kunveno: réunion	Riĉeco: richesse
Ĉefo: chef	Kuzo: cousin	Rotariano: membre du Rotary Club
Ĉu ne?: n'est-ce pas?	Laborema: travailleur-euse	Samideano: qui a les mêmes idées
Distanco: distance	Loĝi: habiter	Sendube: sans aucun doute
Dormena: grand dormeur-euse	Malfrue: en retard/tard	Tertremo: tremblement de terre
Eble: peut-être	Malsano: maladie	Trankvila: tranquille
Facileco: facilité	Martelo: marteau	Trezoro: trésor
Faciligi: faciliter	Meksiko: Mexique	Urbano: citadin
Farti: porter (santé)	Mensogema: menteur-euse	Vilaĝano: vilageois
Fiereco: orgueil, fierté	Morti: mourir	
Inter: entre	Nepo: petit-fils	
	Nevo: neveu	

Kara amiko: cu vi ŝatas poemojn? Ni legos poemon de la irlandano Thomas Moore (1779 – 1852), unu el la plej popularaj nomoj de la angla literaturo. Tradukis ĝin Antono Grabowski (1857 – 1923).

SONORILOJ DE VESPERO

**Sonoriloj de Vespero, sonoriloj de vespero!
Kiom ili rakontadas pri juneco kaj espero,
Pri la domo de gepatroj, pri la dolĉa kora ĝojo,
Kiam mi ilian sonon aŭdis je la lasta fojo!
Longe, longe jam forpasis tiuj de l ĝojeco horoj!
Ekdorminte je eterne jam ne batas multaj koroj.
En la tomboj ili loĝas post la ĝojo kaj sufero:
Ne por ili la muziko, sonoriloj de vespero!
Ankaŭ kiam mi ripozos je eterne en trankvilo,
Ne ekhaltos la batado de vespera sonorilo,
Dum kun kantoj novaj bardoj paŝos jam sur nia tero
Kaj vin aŭdos kaj vin laŭdos, sonoriloj de vespero!**

Remarque: Dans ce poème on trouve les mots "**ekdorminte**" kaj "**ekhaltos**". Ces mots possèdent le préfixe "**ek**"(nous ne l'avons pas encore étudié)qui est utilisé pour indiquer le début d'une action. Nous le verrons plus tard. **Ĝis baldaŭ!**

Sonorilo: cloche
Vespero: soir
Rakonti: raconter
Gepatroj: parents

Aŭdi: entendre
Fojo: fois
Longe: il y a longtemps
Forpasi: disparaître
Ekdormi: s'endormir
Je: préposition indéfinie
Ekhalti: s'arrêter
Bati: battre
Paŝi: marcher
Laŭdi: vanter/faire des éloges

REPONSES leçon 11

- 1. Jes, mi admiras la facilecon de Esperanto.**
- 2. Jes, mi pensas ke ĝi estas iom naiva. (Ne, mi ne pensas ke ĝi estas iom naiva).**
- 3. Mi loĝas en urbo. (mi loĝas en vilaĝo).**
- 4. Jes, vi pravas. (Ne, vi ne pravas).**
- 5. Jes, estas aliaj samideanoj en mia urbo. (Ne, ne estas aliaj samideanoj en mia urbo).**

Leçon 12 : impératif, affixes -ul, -ebl, -ind, re-, eks-

Le verbe indique ce que les gens et les animaux font ou ce qu'ils ressentent, il sert aussi à indiquer l'état des êtres humains, des animaux ou des choses. Jusqu'ici nous avons vu les verbes suivants: Infinitif (étudier, parler, chanter). En Espéranto ils se terminent en "i": (**studi, paroli, kanti**).

Présent (j'étudie, tu parles, ils chantent). En Espéranto ils se terminent en "as", il n'y a pas de différence entre les personnes (**mi studas, vi parolas, ili kantas**).

Passé (j'ai étudié, il a parlé, ils ont chanté). En Espéranto ils se terminent en "is" pour toutes les personnes (**mi studis, li parolis, ili kantis**).

Futur (j'étudierai, il parlera, ils chanteront) En Espéranto ils se terminent en "os"

Conditionnel (j'étudierais, il parlerait, ils chanteraient). En Espéranto ils se terminent en "us" pour toutes les personnes (**mi studus, li parolus, ili kantus**).

LA TERMINAISON – U : Elle indique l'impératif et sert à donner:

1. Des ordres directs: **studu!** (Étudiez!). **Parolu!** (Parlez!). **kantu!** (Chantez!).

- **La direktoro ordonis al la lernantoj: Studu pli diligente!**

- **La instruisto diris: Ne babilu** (bavarder) **dum la klaso!**

- **La reĝo ordonis al la sklavoĵ: Kantu!**

2. Des ordres indirects et des souhaits: **La instruisto volas ke ni studu. Mi deziras ke li parolu. La publiko petas ke ŝi kantu.**

- **Li deziras ke sia edzino** (femme) **venu.**

- **Ĉu vi deziras ke mi rakontu** (raconte) **anekdoton?**

- **La registaro** (gouvernement) **postulas** (exige) **ke ni pagu la impostojn** (impôts).

ĈE: en, chez

Ludoviko (Louis): - **Hodiaŭ mi vizitos vin.**

Mikaelo (Michel): - **Venu ĉe mi inter la oka kaj deka vespere.**

ĈEESTI: (être présent à) assister

Vilhelmo (Guillaume): - **La Universala Kongreso de Esperanto okazos (aura lieu) dum Junio en Madrido. Ĉu vi ĉeestos?**

Olga: - **Mi ne povos ĉeesti. Mia edzo estas malsana.**

Le suffixe – UL: Il sert à désigner l'individu qui possède la qualité indiquée par la racine du mot.

Exemples:

- **Junulo**: un jeune homme

- **Junulo estas juna viro** (homme).

- **Maljunulo**: un homme âgé

- **Fortulo**: une personne forte.

- **Fortulo estas forta viro.**

- **Drinkemulo**: un buveur (un ivrogne)

- **Ulo**: un individu

- **Belulino estas bela virino.** (bel - ul - in - o)

- **Ĉu via avo estas junulo? Ne, mia avo estas maljunulo.**

- **Ĉu en Finnlando** (Finlande) **estas multaj belulinoj? Mi ne scias. Mi neniam estis tie.**

- **Kiuj estis la ŝtelistoj de la banko? Nekonataj uloj** (individus inconnus).

- **Kion faras drinkemulo? Drinkemulo drinkas** (il boit trop) **alkoholaĵojn.**

- **Ĉu boksistoj estas fortuloj?. Jes, boksistoj estas fortuloj.**

LE SUFFIXE - EBL: Il sert à indiquer la possibilité

Exemples:

- Vidi : voir	Videbla : visible
- Trinki : boire	Trinkebla : buvable, potable
- Kompreni : comprendre	Komprenebla : compréhensible

- **Dum la nokto nigra kato ne estas videbla.**
- **Tiu ĉi akvo estas trinkebla.**
- **Esperanto estas komprenebla lingvo (langue).**
- **Ĉu viaj pensoj estas videblaj? Ne, ili ne estas videblaj.**
- **Ĉu la akvo kun koto (boue) estas trinkebla? Ne, Ĝi ne estas trinkebla (buvable).**
- **Ĉu formiko (fourmi) estas videbla dum la nokto? Ne, ĝi ne estas videbla.**

TRA: à travers

- **Ĉu la vitro (verre) estas travidebla (transparent)? Jes, la vitro estas travidebla.**
- **Ĉu la ligno (bois) estas travidebla? Ne, la ligno ne estas travidebla.**

EBLE: peut-être

- **Karlo (Charles): - Ĉu vi iros al la Universala Kongreso de Esperanto?**
- **Frederiko (Frédéric): - Eble.**

NEEBLE: impossible

- Antono: - Mi invitas vin ludi tenison (tennis).**
- Rikardo: - Neeble. Mi devas labori.**

KOMPRENEBLE: compréhensiblement (adverbe, synonyme de "bien sûr")

- Alberto: - Ĉu Francio (France) estas en Eŭropo?**
- Rodolfo: - Kompreneble! (bien sûr!).**

Le suffixe - IND: Il indique ce qui est "digne de".

Exemples:

Vidi : voir	Vidinda : digne d'être vu
Legi : lire	Leginda : digne d'être lu
Kompati : plaindre	Kompatinda : digne de pitié
Bedaŭri : regretter	Bedaŭrinda : digne de regretter, regrettable

- **Venecio (Venise) estas vidinda urbo**
- **"Don Quijote de la Mancha" estas leginda libro.**
- **Tiu mizerulo (mizero: misère) estas kompatinda.**
- **Meksiko (Mexique) estas vizitinda lando.**
- **Ĉu Romo kaj Parizo estas vizitindaj urboj?. Jes, tie estas multaj vidindaĵoj (choses qui méritent d'être vues).**
- **Kial estas admirindaj la verkoj (oeuvre d'art) de Mikelanĝelo (Michel Ange). Ĉar estas beleco en liaj pentraĵoj (peintures) kaj skulptaĵoj (sculptures).**

Kara lernanto: Mi supozas (je suppose) ke vi estas laca (fatigué). Do (donc) ni lernos du prefiksojn, kiuj estas tre facilaj.

LE PRÉFIXE – RE : Il indique une répétition.

Fari: faire

Refari: refaire

Legi: lire

Relegi: relire

Komenci: commencer à

Rekomenci: recommencer

- **Mi ne ŝatas ĉi tiun leteron. Mi devos refari ĝin.**

- **Estas konsilinde** (il est recommandé) **relegi la antaŭajn** (précédentes) **lecionojn.**

- **Ŝi faris fuŝaĵon** (erreur). **Ŝi devos rekomenci la laboron.**

- **Kiam vi revenos** (rentreras/rentrerez)? **Eble mi revenos morgaŭ.**

- **Kiam li reiros** (repartira)? **Li reiros dum la proksima semajno.**

LE PRÉFIXE - EKS: ex/ancien.

Exemples: **Eksedzo**: Ex -mari

Eksministro: ex ministre/ancien ministre

Eksinstruisto: ex maître

LETERFRAGMENTO:

Kara amik (in) o: Mi ricevis vian (belan poŝtkarton) (leteron). Kiel kutime (comme d'habitude) **mi legis ĝin kun granda intereso. Koran dankon!**

Ĉu vi ŝatas muzikon?. Ĉu via lando havas folkloran muzikon? En mia lando estas tipika folkloro muziko. Ĉiujare (chaque année) **okazas** (ont lieu) **festivaloj, kun partopreno** (participation) **de diversaj ensembloj** (groupes de musiciens). **Multaj personoj ĉeestas tiujn festivalojn, kiuj estas grandaj sukcesoj** (succès).

Mi preferas modernan muzikon kaj la jenajn (suivants) **ensemblojn....**

Mi preferas klasikan muzikon kaj la jenajn orkestrojn:...

Mi restas (je reste) **atendante vian respondon. Intertempe** (pendant) **bonvolu akcepti korajn salutojn de via amiko.**

EXPRESSIONS UTILES

* pour la conversation

Sendube...(Sans aucun doute...)

Cetere...(Cela dit...)

Ne gravas...(Peu importe...)

Aliflanke, ...(D'ailleurs)

Ĉu vi vidas? (Vous voyez?), c'est-à-dire "vous comprenez?"

Kiel vi povas supozi.....(Comme on peut supposer)

Kiel estis espereble....(Comme on s'y attendait)

Mi bedaŭras. (Je suis désolé/je regrette)

Ŝajnas nekredeble! (C'est incroyable!)

• Pour présenter une personne -

Arturo: - **Permesu ke mi prezentu al vi s- ron Petro Lopez.**

García: - **Plezuron!. Mi estas Johano García. Kiel vi fartas?**

Lopez: - **Mi fartas bone. Dankon. Kaj vi?**

García: - **Bone. Dankon.**

La conversation continue sur différents sujets;

- pour dire au revoir on dit:-

López: - **Ĝis revido!** (Au revoir!)

García: - **Ĝis baldaŭ!** (à bientôt!) (on peut aussi répondre de la même manière: **Ĝis revido!**)

"L'Espéranto a devant soi un avenir brillant"

Saint Pie X

VOCABULAIRE leçon 12

Alkoholaĵo: boisson alcoolique

Antaŭa: précédent

Babili: bavarder

Bedaŭri: regretter

Biero: bière

Boksisto: boxeur

Bonvoli: bien vouloir

Do: donc

Drinki: boire trop

Eŭropo: Europe

Finnlando: Finlande

Formiko: fourmi

Francio: France

Fuŝaĵo: erreur

Fuŝi: se tromper

Hejmo: maison/foyer

Imposto: impôt

Kompati: plaindre

Konsili: conseiller

Koto: boue

Laca: fatigué-e

Meksiko: Mexique (pays)

Meksikurbo: Mexico (ville)

Mikelaĝelo: Michel-Ange

Mizero: misère

Ordoni: ordonner

Pagi: payer

Penso: pensée

Pentraĵo: peinture

Permesi: permettre

Peti: demander

Postuli: exiger

Prefikso: préfixe

Proksima: prochain-e

Publiko: public

Rakonti: raconter

Reĝo: roi

Registaro: gouvernement

Reiri: repartir

Reveni: rentrer/retourner

Sklavo: esclave

Skulptaĵo: sculpture

Supozi: : supposer

Trinki: boire

Venecio: Venise

Verko: oeuvre d'art

Vidindaĵo: chose qui mérite d'être vue

Vino: vin

Viskio: whisky (boisson)

Voli: vouloir

EXERCICES leçon 12

- **Bonvolu respondi la demandojn:**

1. **Ĉu instruistoj ŝatas ke la lernantoj babilu dum la klaso?**

2. **Ĉu Hispanio (Espagne) estas en Eŭropo?**

3. **Kiuj vidindaĵoj estas en via urbo?**

4. **Kion vi diras kiam oni prezentas al vi alian (autre) esperantiston?**

- Traduisez en Espéranto:

5. Il est impossible d'étudier avec tout ce bruit. **(tiom da)**

6. Les mauvais étudiants ne vont pas en classe.

7. Ils rentreront lundi prochain.

8. Ce clown **(pajaco)** est vraiment un type **(ulo)** sympathique.

9. Je regrette que le texte **(teksto)** ait été incompréhensible.

"L'Espéranto est une langue très bien structurée. Du point de vue linguistique il respecte des critères d'économie et d'efficacité. Tous les mouvements pour les langues internationales ont échoué; ce n'est pas le cas de l'Espéranto qui réunit des hommes du monde entier car il implique un idéal. À mon avis, Zamenhof, son créateur, a créé non seulement un système linguistique mais aussi un idéal de pacifisme et de fraternité".
Umberto Eco (sémologue et écrivain contemporain)

REPONSES leçon 12

- 1. Ne, instruistoj ne ŝatas ke la lernantoj babilu dum la klaso.**
- 2. Kompreneble.**
- 3. En mia urbo estas multaj vidindaĵoj. (En mia urbo estas kelkaj vidindaĵoj).**
- 4. Plezuron !**
- 5. Estas neeble studi kun tiom da bruoj.**
- 6. La malbonaj lernantoj ne ĉeestas la klasojn.**
- 7. Ili revenos la proksiman lundon.**
- 8. Tiu pajaco estas vere simpatia ulo.**
- 9. Mi bedaŭras ke la teksto estis nekomprenebla.**

Leçon 13 : affixes ge-, bo-, -ar, -ad, -ek, -obl, -on

LE PRÉFIXE – GE: Il sert à regrouper dans un seul mot deux autres mots de genre différent (masculin et féminin) On ne l'emploie que pour des êtres humains.

Gepatroj: parents (père et mère)

Gefratoj: frères et soeurs

Gesinjoroj: messieurs-dames

- **La infano** (enfant) **vojaĝas kun siaj gepatroj.**
- **Mi havas tri gefratojn.**
- **Gesinjoroj Gómez loĝas en tiu domo.**
- **Alfredo kaj Eva estas geedzoj** (mariés).
- **Kiom da gefratoj mi havas? Vi havas tri gefratojn.**
- **Kiuj loĝas en tiu domo? Gesinjoroj Gómez loĝas en tiu domo.**
- **Ĉu Alfredo kaj Eva estas gefianĉoj** (fiancés)? **Ne, ili estas geedzoj.**

LE PRÉFIXE - BO: Il désigne les liens de parenté avec la belle famille d'un des deux époux.

Bopatro: beau-père

Bopatrino: belle-mère

Bofrato: beau-frère

Bofratino: belle-soeur

Parento (parent) **per Adamo** (Adam)

* **Ĉu vi havas multajn parencojn, S- ro Smith?**

* **Jes, multajn parencojn.**

* **Ĉu Tolo Sánchez, el Andaluzio, estas via parento?**

* **Ne. Eble ni estas parencoj per Adamo.**

LE SUFFIXE - AR: Il sert à indiquer l'ensemble des choses de la même espèce.

Arbo: arbre

Arbaro: forêt

Vagono: wagon

Vagonaro: train

Vorto: mot

Vortaro: dictionnaire

Homo: être humain (masculin ou féminin)

Homaro: humanité

- **En la arbaro estas multaj bestoj.**
- **La lokomotivo** (locomotive) **kaj la vagonoj formas la vagonaron.**
- **Vortaroj estas tre utilaj por lerni fremdajn** (étrangères) **lingvojn.**
- **La hotelo havas lifton** (ascenseur) **kaj ankaŭ ŝtuparon** (escalier).
- **Kie devas iri tiu, kiu deziras ĉasi** (chasser) **bestojn? La ĉasisto** (chasseur) **devas iri al la arbaro.**
- **Ĉu vi havas vortaron? Jes, mi havas plurajn** (plusieurs) **vortarojn.**
- **Ĉu Esperanto estas lingvo por iu lando? Ne, Esperanto estas lingvo por la homaro.**

"Kiu timas bestaron, ne iru en la arbaro" (proverbo)

LE SUFFIXE - AD: Il indique une action qui se prolonge ou se répète.

Pafado: coup de feu/tir

Pafado: fusillade

Martelo: marteau

Martelado: martèlement

Korespondi: correspondre
régulièrement.

Korespondadi: correspondre fréquemment,

- Dum la revolucio mi ofte aŭdis pafadon.
- Tiu martelado ĝenas (dérange) lin.
- Korespondi kun esperantistoj estas vera plezuro.
- Ĉu vi ŝatas longajn paroladojn? Ne, mi preferas mallongajn paroladojn.
- Kiu estas tiu ulo (homme), kiu konstante babiladas? Tiu ulo estas ĉarlatano (vendeur de camelote).
- Ĉu vi studadas esperanton? Jes, mi studadas por paroli korekte.

LE PRÉFIXE - EK: il indique le début d'une action.

Plori : pleurer	Ekplori : commencer à pleurer
Iri : aller	Ekiri : démarrer, commencer à marcher
Vidi : voir	Ekvidi : apercevoir
Stari : être debout	Ekstari : se mettre debout

- La fino de la filmo estis tre malgaja (triste). Ĉiuj ekploris.
- La generalo ordonis al la soldatoj: Ekiru! (allez-y).
- Inter la nuboj (nuages) ni ekvidis la sunon.
- Kiam la orkestro ludis (joue) la himnon, ĉiuj ekstaris.

DIALOGO: Nova najbaro (voisin)

- Vi estas S-ro Sierra, ĉu ne?
- Jes.
- Permesu prezenti min. Mi estas Rikardo Rossi, via nova najbaro.
- Plezuron! Mi esperas ke vi vizitos min kun via familio.
- Certe. Tio estos por ni vera plezuro. Ĝis revido S-ro Sierra.
- Ĝis baldaŭ!

Sendube proverboj estas utilaj dum la konversacio. Jen (voici) kelkaj proverboj el la libro "Proverbaro" de L.L Zamenhof, kaj la ekvivalentoj en la franca lingvo.

- Homo proponas, Dio disponas. (L'homme propose et Dieu dispose)
- Kiu silentas, tiu konsentas. (Qui ne dit mot consent)
- Kiu ne riskas, tiu ne gajnas. (Qui ne risque rien n'a rien)
- Kapuĉo monaĥon ne faras. (L'habit ne fait pas le moine)
- Pli bone malfrue ol neniam (Mieux vaut tard que jamais)
- Plej bone ridas kiu laste ridas. (Rira bien qui rira le dernier)
- Neniam prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ. (Il ne faut pas remettre au lendemain ce que l'on peut faire le jour même)
- Kiu frue leviĝas, facile riĉiĝas. (A bon gain, qui se lève le matin)
- Se okuloj ne vidas, koro ne avidas. (Loin des yeux, loin du cœur)
- De la diro al la faro estas longa ŝtuparo (escalier) (Les grands diseurs ne sont pas les grands faiseurs)
- Inter blinduloj (aveugles) regas strabulo. (Au royaume des aveugles, les borgnes sont rois)

LE SUFFIXE - OBL: Il sert à former les multiples.

Duobla : double
Triobla : triple
Kvarobla : quadruple
Multobligi : multiplier

LE SUFFIXE - ON: Pour former les fractions.

Duono : une moitié

Triono: un tiers
Kvarono: un quart
Kvinono: un cinquième/ une cinquième partie

Tuta cirklo

Duono

Kvarono

Nun ni lernos KALKULI (calculer, compter) en Esperanto:

Kvin plus ses= dek unu	(5+6= 11)
Ses minus kvin= unu	(6-5= 1)
Sesoble ses=36	(6x6=36)
Duone ses = 3	(6 ·/· 2 = 3)

Dans la leçon N°10 nous avons appris à dire l'heure. Nous verrons par la suite une autre forme, très fréquente, en employant les fractions "kvarono" et "duono".

KIOMA HORO ESTAS ?

Estas kvarono post la unua

Estas duono post la unua

Estas kvarono antaŭ la dua

- **Ĉu vi havas horloĝon? Jes, mi havas brakhorloĝon** (montre)
- **Ĉu via avo havas brakhorloĝon? Ne, li havas poŝhorloĝon** (montre de poche).
- **Kion montras la longa montrilo? Ĝi montras la horon.**
- **Kion montras la mallonga montrilo? Ĝi montras la minutojn.**
- **Ĉu via horloĝo rapidas** (avance) **aŭ malrapidas** (retarde)? **Ne, mia horloĝo estas ekzakta.**
- **Ĉu via horloĝo havas du montrilojn? Ne, mia horloĝo havas alian montrilon, kiu montras la sekundojn.**
- **Je kioma horo matene vi iras labori? Mi iras labori je la sepa matene.**
- **Je kioma horo vi finas la laboron? Mi finas la laboron je duono post la oka vespere.**
- **Je kioma horo vi matenmanĝas? Mi matenmanĝas je kvarono post la sesa.**

brakhorloĝo: montre

poŝhorloĝo: montre de poche

murhorloĝo: horloge

pendolhorloĝo: pendule

kukolhorloĝo: coucou

vekhoroĝo: réveille-matin

JE KIOMA HORO ?

Stefano (Stephane) : - Mi pensas ke estas bonega ideo organizi kurson de Esperanto en nia urbo. Ni povus kunveni hodiaŭ je la sesa vespere por fari la aranĝojn.

Cezaro (César) : - Mi devas labori ĝis duono post la sesa.

Gvadelupo (Guadeloupe) : - Ĉi vespere mi iros al la frizisto de la dua ĝis proksimume kvarono antaŭ la sepa.

Amanda: - Kaj mi akceptos (recevrai) **kelkajn amikinojn por ludi kartojn. Mi estos okupita ĝis duono post la sepa.**

Stefano: - Nu (donc bien), **ni kunvenos je la oka vespere.**

Ĉiuj : - Konsentite! (d'accord).

"Il faut que l'Espéranto soit enseigné de façon officielle et obligatoire dans les écoles d'Europe. Sans cela on ne pourra jamais arriver à obtenir une approche sérieuse et durable entre les peuples. Pour que les peuples s'entendent il faut, tout d'abord, qu'ils puissent s'écouter et, en s'écoutant qu'ils se comprennent".

Romain Rolland

EXERCICES leçon 13

-Bonvolu respondi en Esperanto la jenajn demandojn:

1. Ĉu vi loĝas ĉe viaj gepatroj?
2. Kalvulo estas homo, kiu perdis la hararon, ĉu ne?
3. Kiom faras kvar plus ses?
4. Kiom estas sepoble dek?
5. Kiom estas la triono de dekkvin?
6. Kiom faras kvindek minus dek ok?

Bonvolu traduki al Esperanto:

7. J'achèterai un billet (**bileto**) pour que ma belle-mère voyage en Tanzanie (**Tanzanio**).
8. Ce craquement permanent (**kraki**: craquer) me dérange.
9. Ceux qui travailleront avec intensité recevront un salaire double.
10. Le bus part (**ekiras**) à six heures et quart.
11. Monsieur et madame Prado ont un beau coucou dans leur salon (**salono**).

REPONSES leçon 13

1. Jes, mi loĝas ĉe miaj gepatroj. (Ne, mi ne loĝas ĉe miaj gepatroj).
2. Jes, kalvulo estas homo kiu perdis la hararon.
3. Dek.
4. Sepdek.
5. Kvin.
6. Tridek du.
7. Mi aĉetos bileton por ke mia bopatrino vojaĝu al Tanzanio.
8. Tiu konstanta krakado min ĝenas.
9. Kiuĵ intense laboros ricevos duoblan salajron.
10. La omnibŭso ekiras je la sesa kaj kvarono.
11. La geedzoj Prado havas belan kukolhorlogon en la salono.

Leçon 14 : Verbes, temps simples et temps composés

TEMPS SIMPLES

Il s'agit de ceux que nous avons vu jusqu'à présent, et qui ne sont traduits que par un seul mot (**mi parolas, skribis, li legos, ni pensus, ktp**)

TEMPS COMPOSÉS ACTIFS

On les forme avec l'auxiliaire **ESTI** (être) et un PARTICIPE.

Qu'est-ce que c'est un "participe"? C'est un mot formé à partir des verbes mais qui, dans la phrase, fonctionne comme adjectif, substantif ou adverbe.

Les participes peuvent être "actifs" quand ils désignent l'agent d'une action ou "passifs" quand ils signalent les personnes ou les choses qui subissent l'effet d'une action.

Dans cette leçon nous nous limiterons à étudier les participes actifs qui se forment en ajoutant les terminaisons - **ONTA**, - **ANTA**, - **INTA**, au verbe selon qu'il s'agisse du temps futur, présent ou passé.

L'auxiliaire **ESTI** détermine le MOMENT (Présent, Passé ou Futur) DE LA SITUATION DANS LAQUELLE SE TROUVE LE SUJET DE LA PHRASE

Le PARTICIPE détermine le MOMENT de l'action.

Exemples avec des participes actifs

